# Ĉu vi aŭdis, ke… - Artema elefanto

## Konsiloj por la uzo de la materialo

En tiu ĉi ekzerco vi trovas sonmaterialon kun pluraj tipoj de kontrolekzercoj, kiujn vi povas uzi unu post la aliaj aŭ en grupo. La instruisto povas utiligi ilin ankaŭ tiel, ke etaj grupoj ricevas diversajn ekzercojn.

<u>Jen la procezo de la laboro</u>

1. Aŭskultu dufoje la koncernan novaĵon, klopodu kompreni la temon.

2. Post la dua aŭskultado rigardu la taskfolion, provu respondi al la demandoj, pri kies ĝusta respondo vi certas. (ĉ. 5 min.)
Ne ĉagreniĝu, se vi ne komprenis aŭ ne memoras ĉiujn detalojn. En tiu fazo decidu je kiu parto vi devos pli atenteme koncentri vian atenton dum la sekva aŭskultado.

3. Aŭskultu trian fojon la novaĵon, sed nun jam sekvante la demandojn de la testo. La espondojn aldonu nur je la fino, alimaniere vi perdas la fadenon.

4. Kaze de duboj, je la kvara aŭskultado haltigu la magnetofonon po partoj. Faru kontrolon aŭ aldonu la mankantajn erojn.

(5. Se vi volas solvi alitipan ekzercon laŭbaze de la sama materialo, provu solvi ties taskojn unue ne aŭskultante la tekston, nur memorante ĝin. Se mankas informoj, vi denove aŭskultu la tekston. )

6. Nun venu la solvoj. Ne turnu vin al la solvoj pli frue ol tiu ĉi fazo. Se vi trovas diferencon komparinte viajn solvojn al la donitaj, aŭskultu denove la materialon klopodante trovi la kaŭzon de la malsameco.

7. Por forigi dubojn pri problemaj punktoj oni povas reaŭdi la tekston aŭ rigardi nun la skribitan formon kaj citante el tiu argumenti. Atentu, kelkaj demandoj estas ruzaj, ofte temas nur pri unu-litera diferenco!

8. Por forigi ĉiujn viajn dubojn aŭ premii vin pro la sukceso, bonvolu reaŭskulti la kasedon tiel, ke sekvu ankaŭ la skribitan version de la teksto, kiun vi trovas post la solvoj, lastpaĝe.

9. Estas bona resumo aŭ je la sama leciono, aŭ komence de la posta renkontiĝo solvi la taskon nr. 3 kiu fakte resumas la tekston, sed ne per la samaj vortoj.

10. Ĉi tie povas finiĝi la evoluigo de la komprenkapablo. Sed ne la trejnado! Provu rakonti la aŭditan novaĵon aŭ resumi ĝin skribe. Klaĉu pri ĝi al viaj samideanoj aŭ korespondamikoj. Atentu ke la tekstoj, skribitaj en la unua persono, bezonas transformadon.

## Tasko 1

**Decidu, ĉu la aserto estas vera aŭ falsa.**
**Atentu, vi devas respondi laŭ la aŭdita teksto kaj ne laŭ via logiko aŭ aliaj informoj (ekz. ilustraĵoj !)**

| | Vero | Falso |
|---|---|---|
| 1. En Usono estis prezentitaj pribestaj pentraĵoj. | ❑ | ❑ |
| 2. Estis neatendite, ke la organizintoj aĉetis la bildojn kontraŭ multe da mono. | ❑ | ❑ |
| 3. La bestoĝardeno riĉiĝis pere de la enspezoj. | ❑ | ❑ |
| 4. La bildoj pentriĝis pere de la rostro de la elefantino. | ❑ | ❑ |
| 5. La esploristoj konstatis, ke la bildoj estas koloraj. | ❑ | ❑ |
| 6. La pentraĵoj bone montras la evoluon de la bestoj. | ❑ | ❑ |
| 7. La elefanto rajtas krei nur dufoje ĉiusemajne. | ❑ | ❑ |
| 8. La direktoro volas vendi la bildojn en ekzotikaj landoj. | ❑ | ❑ |
| 9. La direktoro ne volis, ke la merkato pleniĝu je la bestaj kreaĵoj. | ❑ | ❑ |
| 10. La teksto temis pri ordinara evento. | ❑ | ❑ |



Pentraĵo de Nom Chok (Tajlando)

## Tasko 2

*Elektu la ĝustan respondon laŭ la teksto. Atentu, vi devas respondi laŭ la aŭdita teksto kaj ne laŭ via logiko aŭ aliaj informoj (ekz. ilustraĵoj!)*

**1. Ekis grandan sensacion, ke ... .**
a. elefantino kreis bildojn
b. elefantino iris al ekspozicio
c. oni pentris bildojn pri elefantino
d. elefantino detruis bildojn dum ekspozicio

**2. La zoologia ĝardeno troviĝas en ... .**
a. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko
b. Unuiĝintaj Nacioj
c. Soveta-Unio
d. Unesko

**3. La organizintoj pensis, ke la bildoj ... .**
a. vendiĝos rapide
b. ne valoras multon
c. estas pezaj
d. verdiĝas

**4. La bildoj ... .**
a. kaŭzis grandan skandalon
b. montras enprofundiĝon de la bestoj
c. fiaskigis la ĝardenon
d. portis profiton al la ĝardeno

**5. Analizinte la bildojn, oni deklaris, ke ... .**
a. temas pri bestaj verkoj
b. la pentraĵoj fariĝas pli kaj pli buntaj
c. la pentraĵoj reprezentas la evoluon de la bestoj
d. la rostro de la elefantino estas valora

**6. La direktoro de la bestoĝardeno ... .**
a. planis veturi al ekzotika lando
b. montras animan enprofundiĝon
c. laborigis sian edzinon nur dufoje semajne
d. ne volis, ke estu multaj bildoj sur la merkato

**7. La elefantino famiĝis ... .**
a. pro sia valora nazo
b. per bildoj, pentritaj de ĝi mem
c. danke al bildoj, pentritaj pri ĝi
d. ĉar ĝi rapide kaj bonpreze vendiĝis

## Tasko 3

***Kompletigu la frazojn laŭ la enhavo de la teksto***

1. En iu zooparko de Usono ekis grandan sensacion .................... de elefantino.

2. Oni .................. ................. organizis ekspozicion el la bestaj verkoj.

3. La organizintojn surprizis, ke la bildoj ....................... kaj .................. vendiĝis.

4. Tiel kreskiĝis la ........................... de la bestoĝardeno.

5. Kreante la pentristino uzas sian netakseble valoran ……………..... kaj pli kaj pli da ........................... .

6. Laŭ la ........................... la bildoj atestas pri iu ..................... enprofundiĝo de la elefantino.

7. La direktoro de la ĝardeno ne dezias, ke la elefantino .......................... ĉiutage.

8. Li intencas malhelpi, ke estu ........... da bildoj sur la merkato.

## 4. Aldonaj taskoj kaj diskuttemoj povas esti:

- Ĉu vi aĉetus pentraĵon, faritan de elefanto?
- Provu ludi la rolon de artvendisto kaj konvinke vendi la suban verkon.
- Estu nun tiu, kiu atakas la elefantposedantojn pri ekspluato de la bestoj.
- Se oni komprenas la anglan lingvon eblas konsulti la hejmpaĝon www.elephantart.com kaj fari pri la enhavo resumon en E-o.



Pentraĵo de Sela (Borobudur – Indonezio)

## Solvoj :

Tasko 1

1-F, 2-F, **3-V**, 4-F, 5-F, 6-F, **7-V**, 8-F, **9-V**, 10-F

Tasko 2

1-A, 2-A, 3-B, 4-D, 5-B, 6-D, 7-B,

Tasko 3

**nur eblaj, sed ne ĉiuj solvoj**

1 - pentraĵoj/bildoj/artaĵoj,
2 - antaŭ nelonge,
3 - rapide/bone/suksece - bonpreze/multekoste/bone
4 - kaptalo/enspezoj
5 - voston (atentu, en la teksto estas “vosto” kaj ne “rostro”!) – koloroj
6 - esploristoj/sciencistoj/observantoj/analizantoj – animan/psikan
7 – laboru/kreu/pentru
8 – tro/multe

# TEKSTO

Artema elefanto

En iu zooparko de Usono estigis grandan sensacion elefantino, kies pentraĵoj famiĝis tiomgrade, ke oni antaŭ nelonge organizis ekspozicion el la bestaj verkoj. Je granda surprizo de la organizintoj la bildoj rapide kaj bonpreze vendiĝis, kreskigante tiel la enspezojn de la bestoĝardeno.
La pentristino senlace pentras plu, uzante por tiu ago sian netakseble valoran voston. Esploristoj de ŝiaj verkoj eĉ tion konstatis, ke la artistino montras evoluon, nome uzas pli kaj pli da koloroj. Ŝiaj bildoj spegulas iun animan enprofundiĝon. La direktoro de la parko decidis permesi labori al ŝi nur dufoje semajne, por eviti, ke ŝi sentu sin devigata por pentri, kaj por ne plenigi la merkaton de la ekzotikaj pentraĵoj.

Estas granda diferenco inter la teksto kaj tio kion la bildo montras al ni. Ĉu vi rimarkis?



Kamsan, la kvarjara tajlanda elefantino pentras - fo(n)to: www.elephantart.com

Rimarko: fine de la franclingva versio de la sama sonmaterialo *(Ĉu vi aŭdis, ke … - Une éléphante artistique)* legeblas franclingva artikolo pri pentremaj elefantoj.